


Bulgara ESPERANTISTO





El la kunsidoj de la 8-a Konsultiĝo de reprezentantoj de la E-asocioj en la socialismaj landoj en Krakovo (vd. p. 15)



Vigle laboras la E-instruisto Nikolaj Bojaĝiev el Plovdiv. Momento el liaj lecionoj en ĉi-jara civitana E-kurso por komencantoj

ENHAVO

Todor Ĵivkov. El la parolado ĉe la fermo de la XI-a kongreso de la Bulgara Komunista Partio	1
Nikolaj Zidarov. Romantiko. Traduko de D. Haĝiev — Tempesto	3
Geo Neŝev. La „Don-kozakoj“ de Panagjuriŝte	3
* * * Testamento al la generaciöj . . .	5
Kipra Dobрева. „Ni decidiĝis morti . . .“	6
Venceslav Naĉev. „Por la kara libero kaj rajtoj homaj“	8
Ĥristo Gorov. Kavaliro de du steloj . .	10
Instruisto. Nacia Pedagogia Esperanto-konferenco	10
* * * Предложения на Националната педагогическа есперантска конференция до МНП	13
Kr. Mileva. Jubilea junulara kaj studenta E-konferenco	14
Georgi Dimov. Tri novaj E-societoj en Varna	14
D. Koseva. Marija Angelova en Târĝoviŝte	14
* * * Komunikio pri la Konsultiĝo de reprezentantoj de la E-asocioj en la socialismaj landoj	15
Sofia Sutrova. Pri la internacia korespondado de la bulgaraj esperantistoj . . .	16
A. Pavlov. Baĉo Kiro antaŭ la tribunalo	III
Nano Nanov. „DR Vjetnamo“	IV

Sur la kovrilpaĝo:

La partoprenantoj en la Nacia Pedagogia Esperanto-Konferenco en Vraca (vd. paĝon 12)

Redakta Komitato: Kunĉo VÁLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenĉo JONKOV, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI.

Administra sekretario kaj korektanto:

Minko CONKOVSKI

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

ESPERANTO-FERIADO EN KARLOVO

16—26. VIII. 1976

Ripozo en bela montodomo; pitoreska regiono; kelktagaj ekskursoj (ĉ. 350 km) kun vizito de loĝlokoj famaj pro sia rolo en la bulgara Renesanco kaj la glora Aprila Ribelo kontraŭ la otomanoj — Panagjuriŝte, Kllsura, Kalofer, Sopot, Plovdiv k. a.; amuzvesperoj, konkursoj ka.

Aliĝoj: ĝis 20. VII. 1976. Nombro de la partoprenantoj limigita. Validas la pli frua aliĝo.

Petu detalajn informojn je adreso: Bulgario, 4300 Karlovo, Car Asen 7, Bojidar Leonov.



**EL LA PAROLADO DE K-DO TODOR JIVKOV — UNUA SEKRETA-
RIO DE CK DE BKP KAJ PREZIDANTO DE LA ŜTATA SOVETO DE
PR BULGARIO, ĈE LA FERMO DE LA XI KONGRESO DE LA
BULGARA KOMUNISTA PARTIO**

Gekamaradoj,

En la laboro de la Dekunua Kongreso de nia partio kiel gastoj partoprenas 150 delegitaroj de komunistaj kaj laboristaj partioj, de socialistaj kaj naci-demokratiaj partioj, organizaĵoj kaj movadoj. Por ni estas granda honoro, ke ili akceptis nian inviton.

Mi estas certa, ke mi esprimos la pensojn de la delegitoj de la kongreso kaj de ĉiuj bulgaraj komunistoj, certigante vin, estimataj gastoj, ke la Bulgara Komunista Partio, la partio de Dimităr Blagoev kaj Geordi Dimitrov, ĉiam estos neŝancebleble fidela al la marksismo-leninismo kaj la proleta internaciismo, ĉiam ĝi paŝos en la batalvicoj de la mondaj komunistaj kaj laborista movadoj, subtenos la justan aferon de la naciliberigaj movadoj, aktive, kune kun ĉiuj honestaj homoj en la mondo partoprenos en la batalo por paco, libero kaj sendependado, por demokratio kaj socia progreso. (Longedaŭraj aplaŭdoj).

Transdonu, karaj gekamaradoj, al viaj partioj kaj popoloj la fratajn salutojn de la bulgaraj komunistoj, de nia tuta popolo. Ni tutkore deziras al vi novajn sukcesojn kaj akirojn en la laboro kaj batalo por la feliĉo kaj la bonstato de viaj popoloj, por la feliĉo kaj la progreso de la homaro. (Tondraj longedaŭraj aplaŭdoj).

Gekamaradoj,

La kongresoj de nia Partio ĉiam estis eksterordinaraj eventoj en ĝia vivo, ili ĉiam havis grandegan efikon sur la sorton de nia popolo, sur la socipolitikan, ekonomian kaj kulturen disvolviĝon de la lando. Ĝuste pro tio



antaŭ la laboro de la nuna kongreso estis sekvata kun granda atento de la komunistoj, de la tuta popolo.

Kiel vi scias, la laboro de la Dekunua Kongreso, ĝiaj kunsidoj estis dissendataj pere de la Bulgaraj Televido kaj Radio kaj raportataj pere de la gazetaro. Tiamaniere partoprenantoj en la kongreso fariĝis ĉiuj bulgaraj komunistoj, ĉiuj bulgaraj civitanoj. Rajte ni povas diri: la Dekunua Kongreso eniris ĉiun bulgaran domon. (Longedaŭraj aplaŭdoj).

La Bulgara Komunista Partio ne havas sekretojn antaŭ sia popolo. Kaj ĝuste en tio estas unu el la sekretoj de niaj sukcesoj. (Tondraj longedaŭraj aplaŭdoj).

Nia Partio estas viva parto de nia popolo, ĝia rekonata kaj amata gvidanto. La bulgara popolo estas popolo politike klera. Sub la gvido de la Partio ĝi trapasis kun honoro la severan lernejon de la batalo kontraŭ la faŝismo kaj la kapitalismo. Sub la gvido de la Partio nia popolo faris miraklojn en la konstruado de la nova vivo. Sub la gvido de la Partio ĝi atingis la plej altan supron en sia dektrijarcenta historio. (Tondraj, longedaŭraj aplaŭdoj). Ĉe ni Partio kaj popolo vere kuniĝis en nedisigeblan unuecon. Ne ekzistas forto en la mondo, ekstera aŭ interna, kiu povus disbati tiun unuecon, rompi la fidelecon de la Partio al sia popolo, la kredon de la popolo en sia Partio! (Ŝtormaj, longedaŭraj aplaŭdoj). Kaj ne estas nur poezia esprimo, kiam ni diras, ke la iama soleca ruĝa papavo¹ hodiaŭ floras en la tuta lando, ke nuntempa Bulgario estas ruĝa — ĝis la lasta sangoguto de la popolo. (Tondraj, longeneĉesantaj aplaŭdoj).

Antaŭ tia popolo nia Partio ne havas kaj ne povas havi iajn ajn sekretojn! (Tondraj aplaŭdoj).

Sekretojn ni ne havas same antaŭ niaj kamaradoj, amikoj, kunbatalantoj en la tuta mondo! (Aplaŭdoj).

Bonega estas, gekamaradoj, la akustiko en nia socialisma lando! (Aplaŭdoj). La justa kaj inspira parolo de la Partio estas aŭdebla bone en ĉiuj anguloj de nia tero, reeĥas en la animoj kaj mensoj de ĉiuj homoj. Kaj ĉiuj popoltavoloj trovis manieron esprimi sian plenan subtenon al tio, kio estis dirita tie ĉi, en tiu ĉi halo. (Tondraj, longedaŭraj aplaŭdoj).

Tio ankoraŭfoje montras, ke la Bulgara Komunista Partio korekte esprimas la esencajn interesojn de la popolo, ĝuste markas la vojojn kaj starigas sur ili la signojn montrantajn al la senpera historia tasko — la konstruado de disvolviĝinta socialisma socio kaj la preparo al iompostioma transiro al la komunismo en nia kara Patrolando — Popola Respubliko Bulgario! (Ŝtormaj, longe ne silentiĝantaj aplaŭdoj).

El la kongreso eliras kun sento de venkintoj ne nur ni, la delegitoj, ne nur ni, la komunistoj. El la kongreso eliras venkinto la tuta bulgara popolo, gvidata kaj direktata de sia Komunista Partio. Ĝi, la popolo, transformos la kongresdecidojn en materialan forton, en vivajn farojn! (Tondraj, longedaŭraj aplaŭdoj).

Tial la lastajn vortojn de tiu ĉi tribuno, vortojn de danko kaj amo, vortojn de alvoko al novaj faroj, ni direktas al nia heroo laborista klaso, al niaj sindonaj agrikulturaj kooperativanoj, al la intelektularo, fidela al la komunismo, al la gloraj bulgaraj virinoj, al la flama bulgara junularo kaj ĝia Dimitrov-Komsomolo. (Ŝtormaj, longedaŭraj aplaŭdoj).

(Sekvas sur p. 4)

¹ Aludo pri la kanto „Ruĝa papavo“ ŝatata de Dimităr Blagoev — la fondinto de la Bulgar Socialdemokrata Partio (1891).



Nikolaj Zidarov

ROMANTIKO

Ni ree sturmas kun aŭdaco.
Ni marŝas ree al la cel'.
Trapasas nia voj' de paco
ĉe lim' divida de l'duel'.
Jes, tio estas romantiko.
Provizas per flugiloj nin
la krea 'kaj verv dinamiko
en ĉiu kampo
kaj uzin'.

La tempo tamen?
Ĝin venkinte
per feraj manoj en duel'
kaj la estonton enirinte,
ĝin hardas ni
ĝis blanka hel'.
Ĝi vivas en la klasbatalo
kaj ligas en severa bel'
malamon per proletmoralo
kun amo
por la sama cel'.
Jes, romantiko estas tio.
Ĝi brilas en la vort' kaj flor';
ĝi pulsas ĝoje nun en ĉio —
en la ĉielo
kaj traktor'.
Aligis nin la historio
al la anaro de l'taĉment',
marŝanta kun l' Internacio
dum jaroj jam en pluv'
kaj vent'.

Flugadas la taĉment'.
Ĝi sternas
jen retojn de altvolta flam' . . .
Konstruoj ŝtalaj ekalternas,
naskitaj de labor',
de am',
de l'varma man' de l'rusa frato
sen nomo aŭ kun fama nom',
veninta el la nova ŝtato
kaj kun kanon', kaj kun atom',
kun ardo kaj kun plan' konstrua,
surfrunte kun rubena stel',
dotinte nin por fojo dua
per rev',
libero
kaj ĉiel'.

Jen romantiko —
el koloro
pioĉa, brilo de la sun'!
Preninte spronon el „Aŭroro“
en niaj agoj
vivas nun:
ĝi en belaĵojn transformiĝas
simile tute al printemp';
per ĝi impete renoviĝas
la mondo
en la nuna temp'.

El la bulgara:

Dimitr Haĝiev — Tempesto

Unu jarcenton en la memoro de Bulgario

LA „DON-KOZAKOJ“ DE PANAGJURIŝTE

Ĉi tie mi deziras rakonti tion, kion mi aŭskultis kaj legis de esplorintoj de la heroo pasinteco de Panagjuriŝte kaj aparte de mia avino Nena Raškova Guĝova—Neŝeva, filino de Raŝko Guĝov — amiko kaj kunbatalanto de Levski kaj Benkovski. Ne temas pri la plej famaj herooj de la Aprila Ribelo — iliajn nomojn ni, bulgaroj, akceptas kune kun la patrino lakto. . .

Inter la nomoj de aprilanoj, kiujn oni flustras kiel legendojn, elstaras la nomo de Krajĉo Samohodov — la standardportanto de la Fluganta Ĉevaltaĉmento de Benkovski. La informoj pri li ne abundas. Jen tamen kelkaj donitaĵoj. Al Krajĉo kiel unu el la plej fidelaj homoj de Benkovski, estis konfida la gardado de la unua bulgara popolkunveno en Oboriŝte. Iom poste,

am promociita kiel centestro, li estis elektita standardportanto. Post la frakaso de la ribelo Krajčo ne klinis sian ribelulan kapon, sed formis taĉmenton en la regiono de Sredna Gora. En 1877 j. tiu taĉmento kondukis la armetrupon de kapitano Galpert al la postfronto de la turkoj kaj tiel helpis la liberigon de Panagjuriŝte.

Alia ne malpli kolorefika figuro estis tiu de Orĉo vojevodo (Ivan M. Parpulov). En la tempo, kiam prepariĝis la Ribelo de Stara Zagora (la aŭtunon de 1875), Orĉo kune kun Benkovski kaj aliaj patriotoj estis komisiita bruligi Istanbulon. Li mem partoprenis ankaŭ la grupon, kiu devis mortigi la sultanon. De tiam datiĝas liaj ligoj kun Benkovski. Dum la Aprila Ribelo Orĉo estis aparte aktiva, Benkovski promociis lin centestro kaj ĉefo de la gardistaro de la revolucia komitato. Orĉo disbatis la baŝibozukon apud v. Strelĉa, tuj foriris al Koprivŝtica kaj tramontopinto Bunaj revenis en Panagjuriŝte kiel venkinto. Oni renkontis lin per la preĝejsonorilegoj. Orĉo estas unu el la herooj en la pafbatalo apud v. Petriĉ, kie li transnaĝis riveron Topolnica kaj mortigis la estron de la turkoj el Zlatica, dank' al kio la Fluganta Taĉmento sub la gvido de Krajčo Samohodov gajnis sian unuan venkon. Trapasinte malliberejojn kaj ekzilejojn Orĉo vojevodo ankaŭ post-la Liberiĝo estis ĉe posteno.

Iskrjo Maĉov, Ivan Ĝuĝev kaj Iljo Stojanov ankaŭ estas fiero por Panagjuriŝte. Iskrjo Maĉov estis kunbatalanto de Levski kaj reprezentanto de la urbo en la popola kunveno en Obo-

riŝte, poste membro de la Provizora Registaro. La eksterordinara honesteco de Ivan Ĝuĝev, same membro de la Provizora Registaro, permesis al la revolucia komitato konfidi al li la nemalgrandan sumon de 1054 turkaj liroj por aĉeto de armiloj el Istanbul. Iljo Stojanov estis tipa revoluciulo. Laborinte sub la gvido de Rakovski, poste li fariĝis unu el la plej fidelaj kaŝantoj de Levski kaj dum la Aprila Ribelo, komandante centopon, gardis la vojon al Zlatica. Post la fiasko de la ribelo Iljo organizis taĉmenton en Okoŝka Korija. En 1877 li kune kun la rusaj herooj partoprenis la liberigon de sia naskiĝurbo.

Sed ne nur pro braveco distingigis la homoj de Panagjuriŝte kaj ĝia regiono. Vera okazo, nepriskribita ĝis nun en la oficialaj kronikoj, parolas elokvente pri tio. ... Ĝin rakontis al mi mia avino Nena.

Strelĉa dronis en sangaj incendioj. La baŝibozuko buĉmortigis ĉion vivan, Tiuj, kiuj sukcesis eskapi de la jatagano forkuris. Mia praavino Pena Guĝova, edzino de la ribelinto Raŝko Guĝov, estis kun siaj kvin infanoj Genĉo, Ĉvetana, Kuna, Nena, Gavril. Kien nun? La plej aĝa infano, Genĉo, proponis: „Al paĉjo!“. Paktuko kun kelkaj panoj kaj 2—3 ĉemizetoj por la infanoj — tio estis ĉio. Pena ekiris kun kelkaj samvilaĝanoj.

La malgranda grupo rapide forlasis la vilaĝon kaj proksime de „Carevi Slive“ haltis por ripozi. Pena kolektis la infanojn ĉirkaŭ sin, nur la plej aĝa, Genĉo, ŝovis sin en la arbustaron. Sed ne pasis eĉ kvin minutoj, kaj li reve-

(El paĝo 2)

Riverancon antaŭ la popolo, popolo-kreanto de ĉiuj materialaj kaj spiritalaj valoraĵoj, karno kaj sango el kies karno kaj sango estas nia patruja Bulgara Komunista Partio! (Ĉiuj ekstaras. Tondraj, longe nesilentiĝantaj aplaŭdoj. Skandado: „BKP—BKP!“, „Kun BKP antaŭen!“).

Mi fermas la XI-an Kongreson de la Bulgara Komunista Partio. (Potenca „Hura!“). Ĉiuj ekkantas „La Internacion“).



nis kurante. Ĉiuj eksaltis, pensante, ke Genĉo estas rimarkinta turkojn.

— Panjo, venu rapide! — kriis la anhelanta knabo.

Pena kun du vilaĝanoj postsekvis lin. Proksime de la loko, kie ili estis haltintaj, estis kaŝita herbejeto. Sur ĝi rampis senhelpa knabineto, ĉirkaŭ unujara. Pena tuj alkuris al la infano. Sed en momento ŝi haltis: la knabineto estis etendinta manojn al ŝi kun la vortoj „panjo“, sed en. . . turka lingvo. Ŝi estis turkidino. Kaj vere — la sakpantalono kaj la veŝto, iom ĉifona, parolis ankaŭ pri tio. Pena ne pensis multe: ŝi kaptis la knabineton kaj premis ŝin al sia brusto.

— Venu, venu, etulineto! Ja vi pri nenio kulpas. Mi kunprenos vin.

La infaneto premis manetojn al tiu ĉi nova patrino kaj ne ploris plu.

— Dio mia, — krucsignis iu vilaĝano, — ankaŭ ŝi estas vivaĵo kiel ni, ankaŭ ŝi estas senhejma. Prenu ŝin, Pena!

Post la sanga frakaso de la ribelo Pena kaŝis sin kun la infanoj en urbo Plovdiv. Kompreneble, ankaŭ la turkidineto estis kun ili. Ŝi ekposedis bulgaran lingvon kaj ludis kun la ceteraj infanoj. Kiam la edzo Raŝko Guĝov revenis el la malliberejo, li akceptis sian novan filinon sen diri ion ajn riproĉan. Li flegis la knabineton, dum ŝi kreskis, kaj edzinigis ŝin.

Tiaj estis niaj praavoj — la „Donkozakoj“ de Panagjuriŝte.

Geo Neŝev

TESTAMENTO AL LA GENERACIOJ

Posteuloj!

Al vi turniĝas ni, la nuntempuloj de la glora Aprila Ribelo de 1876. Ni skribas al vi el la legendeca Oboriŝte, el la solena mitingo-kunveno, organizita de la Nacia Jubilea Komitato sub la prezidanteco de kamarado Todor Ĵivkov — unua sekretario de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario.

Al Oboriŝte, kie la unua bulgara parlamento esprimis la neŝanceleblan volon de la popolo por libero kaj nacia sendependeco, ni alvenis por klini la kapojn antaŭ la heroaĵo kaj la majesta sinofero de aprilanoj. Ni alvenis fieraj pro la historisignifaj akiroj de la bulgara popolo dum la jaroj post la venko de la Socialisma Revolucio je la 9-a de septembro 1944. Efektiviĝis la testamentoj de aprilanoj pri pura kaj sankta respubliko. Realigis la ideoj kaj la revoj de la bulgaraj revoluciuloj pri eterna amikeco kun la rusa popolo. En nerompebla unuiĝo kaj ĉiuflanka kunlaborado kun la potenca Sovetunio pli ol tri jardekojn ni konstruas socialismon en nia amata Patrujo. Ĉie sur la bulgara tero, saturita per la sango de la batalantoj por libero kaj socia justeco, hodiaŭ starigas gigantan staturon nova socialisma Bulgario. Ĝi estas patrujo de liberaj kaj egalrajtaj homoj, sincera amiko de ĉiuj popoloj, kiuj batalas por paco kaj socia progreso.

Al hela estonto nin guidas la Bulgara Komunista Partio. En 1976 j. ĝia Dekunua Kongreso malkovris novajn horizontojn por nia supreniro laŭ la vojo de socialismo kaj komunismo.

Ni testamentas al vi nian fidelecon kaj sindonemon al la Patrolando, al la afero de la socialismo kaj komunismo, kaj ni estas konvinkitaj, ke vi finkondukos Bulgarion al novaj brilantaj suproj.

*Oboriŝte — Bulgario
la 2-an de majo 1976*

Celo: per komuna revolucio fari radikalan ŝanĝon de la nuna ŝtata despota-tirana sistemo kaj anstataŭi ĝin per demokratia respubliko (popola regado).

Vasil LEVSKI (1837—1875)



„NI DECIDIĜIS MORTI. . .“

Ĉirkaŭ kvaronjarcento antaŭ la Aprila Ribelo de 1876 en la vilaĝoj de la regiono de V. Târnovo laboris kiel instruisto Kiro Petrov, kiun la popolo estime nomis „baĉo“¹. La fonditaj de li popola legejo „Vilaĝana Amo“ en Bjala Ĉerkva (lia naskiĝvilaĝo) kaj teatra trupo vekis la bulgarojn al batalo. „Dum nelonga tempo, — skribas la tiutempulo pastro Petko Frangov, — ni preparis la dramon „La multsuferinta Genoveva“, sed ne la tutan — nur la unuan akton. Post tiu akto ni kontinuis per la dramo „Stojan vojevodo“ kaj tiel ĝis la fino.“

En la proksima vilaĝo Miĥalci la scivolema publiko grimpis eĉ sur la tegmentojn de la najbaraj domoj por rigardi la spektaklon tra la fenestroj. Kaj la spektaklo finiĝis, kiel ordinare, per revolucia kanto kaj komuna krio „Vivu Bulgario!“. Kelkaj pafis. Nun sur la scenejo nur, sed baldaŭ, tre baldaŭ oni ekpafos sur la stratoj kaj en la Balkano, en la vera flamanta teatro de la ribelo.

Kelkajn jarojn antaŭ tio en la vilaĝoj apud la rivero Rosica kaj Negovanka aperadis malriĉe vestita monaĥo, ĉirkaŭ 40-jara, altstatura, fortika, kun brunhaŭta vizaĝo kaj eksterordinare vigla kaj penetrema rigardo. Tio estis otec² Matej Preobraĵenski, nomita de la popolo Mitkaloto. En la dupeŝa sako inter la ekleziaj libroj de tiu senlaca revoluciulo estis ankaŭ „Gorski Pâtnik“ (Arbarvojaĝanto) — la fama poemo de Rakovski, kaj kelkaj ekzempleroj de lia ĵurnalo „Dunavski Lebed“ (Danuba cigno). En Miĥalci kaj Musina la monaĥo fondis la leĝojn. Post si li ĉiam lasis flamantajn kapojn kaj ribelemajn animojn.

Tri jarojn antaŭ la historiaj tagoj revenis en sian naskiĝvilaĝon Miĥalci

¹ Baĉo — alparolo al pli aĝa viro (same la alparolo „baj“).

² Ofec — pastro.

Todor Lefterov. Forlasinte sian komercistan karieron en Anglujo, li fariĝis instruisto en la vilaĝo kaj eklaboris laŭ novaj metodoj. Samtempe li komencis agi ankaŭ en la legejo. Skuita ĝis la fundo de sia animo pro la suferoj de la bulgara popolo, li ekkriis: „Pli bone fino kun teruraĵoj ol teruraĵoj sen fino!“

La legejo, tiu originala bulgara fajrujo de sciamo kaj patriotismo, paralele kun sia kleriga laboro fariĝis baza kerno kaj taŭga ŝirmilo por revolucia agado. La ideoj de la batalo, de la revolucio maturiĝis en la animoj. Proksimiĝis jam la horo por ties elprovo en la vivo.

Kiam la ĉefa apostolo de la Unua Revolucia Distrikto de Târnovo Stefan Stambolov transiris Danubon kun siaj helpantoj Georgi Izmirlijev — Makeŝonĉeto kaj Ĥristo Karaminkov — Bunito, por Baĉo Kiro la tagoj fariĝas ege maltrankvilaj. Kun Ĥristo Karaminkov li rondiris trala vilaĝoj, vekis la popolon, fondis revoluciajn komitatojn. Li klarigadis ankaŭ la revolucionan planon de la distrikto: la ribeltaĉmentoj devis direktiĝi al la Balkan-montaro por fermi la intermontojn kaj komenci la liberigon de la pli grandaj urboj.

Ĉirkaŭ la 25-a de aprilo — do, kvin tagojn post la momento, kiam la sango sekiĝis sur la letero de Todor Kableŝkov, ĉi tie oni eksciis pri la ekflaminta ribelo en la Kvara Revolucia Distrikto en Trakio. Estis necese agi rapide. La turkoj komencis aresti gvidantojn de la revoluciaj komitatoj. Sed loko por retiriĝo ne estis — ekmoviĝis la nevidebla kaj timiga forto de la popola ribelo kaj la homoj, kaptitaj de ĝia nereturnebla kaj konsterna marŝo, impetis al la estonto, en kiu la alternativo estis unu — libero aŭ morto.

La 27-a de aprilo. . . la belstatura popo Ĥariton, vestita en ribelula uniformo, venis en v. Misina laŭ ordono

de Stambolov por estri la ribelon. Baĉo Kiro sciigis: „Morgaŭ kun nia taĉmento mi estos en Musina.“

Mallonga estis tiu aprila tago por la vilaĝanoj de Bjala Ĉerkva, kaj en la varma vespero sur la vilaĝa placo ekspiralis la plej furioza kaj plej ĉagrena rondodanco — la adiaŭa rondodanco de la ribeluloj

„Adiaŭ, kara Patrujo, adiaŭ, kara popolo! — skribis Baĉo Kiro, — hodiaŭ mi foriras batali por via libero. . .“ Cent unu taĉmentanoj ekiris el Bjala Ĉerkva. Aligis al ili 29 el Miĥalci, 28 el Musina. Venis homoj ankaŭ el la vilaĝoj Višovgrad, Diĉin, Goljamo Julare (nun Rusalja) k. a. En la taĉmento estis io nova, kiun oni ne vidis inter la ribelintoj en Trakio. En la vicoj de tiu ĉi taĉmento estis ankaŭ Petro Parmakov — oficiro el la rusa armeo. Ĉu tiu homo kun bulgara nomo estis ruso? Ne, li estis vera bulgaro, lerninta la militarton en Rusio, veninta en la decida horo por oferi sian vivon sur la altaro de la bulgara libero. . .

La 28-a de aprilo. . . En pluvoriĉa netravidebla nokto la ribelintoj ekmarŝis al la morgaŭa tago, kiu devis alporti la tiel longe revitan liberon.

Jam la sekvan tagon osmana armetrupo kaj baŝibozuko ekiris post la taĉmento. La ribelintoj atingis la Monaĥejon de Drjanovo, kie komenciĝis la decidaj bataloj.

La multnombra kaj bone armita malamiko sieĝis la taĉmenton. Naŭ tagojn la ribeluloj kontraŭstaris en la malegala batalo, naŭ tagojn iliaj fingroj premis la fusilojn, varmegajn pro senĉesa pafado, naŭ tagojn kun vizaĝoj nigriĝintaj pro la pulvo, fermitaj inter la muroj de la malnova monaĥejo ili ne malesperigis. . .

La 6-a de majo. . . Kiam forflugis la pafilfumo sur la vojo, la ribeluloj vidis Fazlâ paŝaon. Li estis veninta

kun dekmila armeo, ĉerkesoj, baŝibozukoj kaj du kanonoj. La spiritoj estis embarasitaj, sed ne ŝancelitaj. La malamiko pafis per obusoj kaj mesaĝoj.

„Kapitulacu!“ — petis la ĉorbaĝioričuloj de Drjanovo. La monaĥeja fortikaĵo respondis per fajro.

„Kapitulacu, ribeluloj!“ — insistis la furiozanta Fazlâ paŝao. Baĉo Kiro skribis la respondon de la herooj: „Paŝao, ni ribelis kontraŭ vi por defendi nian popolon. . . La popolo volas siajn rajtojn kaj ĝi decidis konkeri ilin eĉ per sia morto. . . Ni decidigis morti kaj ni gardos nian ĵuron. . .“


Malĝojiga novaĵo vundis profunde la korojn — en la pulvodeponejo estis morte vundita pro eksplodo popo Ĥariton. Kiu estu la nova vojevodo? Kompreneble, leŭtenanto Parmakov. „Antaŭ taĉmento kiel ni, — diris Parmakov, — estas du vojoj por saviĝo: aŭ brustal-bruste ekstarti kontraŭ la malamikon kaj breĉi por si vojon, aŭ kapitulaci.“ Li parolis pri du vojoj, sed ĉiuj vidis nur unu — disŝiri la ringon per batalo.

En la malluma nokto la oficiro ekkondukis la homojn ekster la murojn de la monaĥejo. Antaŭ ili estis la malamiko, sed — eble — ankaŭ la liberiĝo aŭ la feliĉa morto por la patrujo. . . En la heroa batalo ĉirkaŭ cent ribeluloj falis en la malluma maja nokto. Kelkaj, inter ili ankaŭ Baĉo Kiro, sukcesis eskapi kaj savi sin. Tamen ne libero ilin atendis, sed tagoj de persekutado, de suferoj kaj de pereco.

Baĉo Kiro sukcesis atingi sian naskiĝvilaĝon. Sed la vilaĝaj superuloj komencis konvinki la ribelulon fordoni sin al la malamikoj kaj tiamaniere savi la vilaĝon kontraŭ sango kaj pogromo. Kaj tiu puranima kaj nobla homo elektis la pendumilon, por ne malutili aliajn, al kiuj li pecon post peco disdonis sian koron, al kiuj tutan vivon li instruis amon al la libero, al la justeco.

¹ Popo (bulg.) — pastro.

„POR LA KARA LIBERO KAJ RAJTOJ HOMAJ!“



Bačo Kiro



Canko Djustabanov
Stefan A. ošev



La montara regiono, kiu etendiĝas de Batoŝevo tra Krâvenik ĝis Novo Selo kaj ampleksas dekon da vilaĝetoj, estas la nura regiono dum la Aprila Ribelo, tute liberigita el la jugo de la otomanoj. Ĝi estis transformita en liberan teritorion, reprezentantan per si mem malgrandan bulgaran ŝtaton, kiu ekzistis nur naŭ tagojn, naŭ terurajn, nekredeblajn tagojn, defenditan per popola sango.

En v. Batoŝevo estis nur unu mahometano — la policisto Hjusein. Kiam eksplodis la ribelo, oni fortranĉis al li unu orelon. Iuj deziris tute mortigi lin, sed Canko¹ ne permesis...

La ribeluloj ekpostenis ĉe Ĉukara. Kaj jen la vojo el Sevlievo malheliĝis pro turbanoj kaj fezoj. Sed la ribeluloj estis ĵurintaj pri fideleco kaj fidelis al sia ĵuro. Iu ekkriis al la vicvojevodo Georgi Boĉarov: „Komandu kiel moskvano!“² Per ruslingva komando ili deziris timigi la malamikon. Kaj komenciĝis... Ĉe Bosevi Kruŝi estis la plej akra batalo. Fleksiĝis la maldikaj ĉenoj de la ribelinto kaj retiriĝis, nur triopo restis supre, nedezirantaj cedi eĉ spano de sia gepatra tero. Jen iliaj nomoj: Tatjo Minĉev, kvardek ses jara, Giĉo Tiĥov kaj Marko Stanĉev. Ili batalis ĝis la lasta spiro. La baŝibozukoj trapikis ilin per multaj jataganoj, detranĉis iliajn kapojn. La kapon de Tatjo ili ĵetis antaŭ la kaptitan Stefan Peŝev — ĉefa organizanto de la ribelo en Sevlievo, kaj diris al li: „Ĉu vi rekonos vian onklon?“ Rekonis Stefan sian onklon kaj unu larmo, vire retenita, bruligis lin...

Poste la sklavigantoj invadis la vilaĝon. La unuorela Hjusein, indulgita de la vojevodo, ekkondukis la sangosoifulojn kaj indikis, kiun domon oni bruligu, kiun ne. Estis lasitaj nur kvar domoj. La preĝejo ankaŭ estis forrabita kaj bruligita...

La 1-an de majo 1876 la viroj el v. Krâvenik, gvidate de la vojevodo Filju Radev, ankaŭ ekiris la vojon de la ribelo. Ili estis ĉ. ducent kvindek homoj. Sur la supro Baban okazis konsiliĝo.

„Junuloj! — per klara voĉo ekparolis la vojevodo. — Laŭ miaj informoj el multaj lokoj, niaj aferoj ekmarŝis bone... Proksimiĝas la fino de la turka regado... Turko ne plu komandos nin. Ni havos bulgaran ŝtaton, kian ni havis antaŭ multaj jaroj...“

Ok tagojn la montpasejo eĥis pro la pafoj, ok tagojn, la polvofumo ne forlasis la ĉirkaŭaĵon de la vilaĝo. La naŭan tagon Filjo-vojevodo ekstaris inter siaj kunuloj kaj per voĉo pli forta ol la sonado de la tamburoj kaj la hurlado de la hobojoj ekkriis:

„Kiu timas, li iru hejmen. Kiu ankoraŭ estas viro, li restu kaj iru post min. Ni ne ribelis por paradi, sed morti por niaj rajtoj kaj libero.“

Post kelkaj tagoj oni ĵetis la kapon de la vojevodo en ĉevalsakon kaj forportis ĝin al Sevlievo. Kaj la kadavro restis por la agloj, kiuj ne malfruis ĝin disŝiri. . .

Novo Selo, la lasta fortikaĵo de la ribelo. La montpasejo de Debnevo fumas kiel bruligita — la kugloj hajas. La sevlievano Jonko Karagiozov kun nuda sabro en la mano kondukas sian anaron kontraŭ la baŝibuzuka svarmo. Kvincent sangosoifuloj ekkuras sub lia premo. Sed kio estas la armiloj de la ribeluloj? La fusiloj tute ne sufiĉas, plej ofte en la manoj estas falĉiloj, lignaj klaboroj aŭ bastonegoj kun ferpecoj je la finoj.

Kaj la vilaĝo jam ekfumis bruligita. Fulmis la sabro de la vojevodo Djustabanov kaj lia voĉo kiel sonorilego frapis la malaltigitan ĉielon: „Fratoj! La baŝibozukoj jam invadis la vilaĝon. La domoj ekbrulis. Ni vidu nun, fratoj, ĉu ankaŭ ni estas hajdutoj kiel Ĥaĝi Dimitro kaj Stefan Karaĝa!“³

La lastaj pafoj eksilentis sub la montopinto Maragidik. La ribelo dro- nis en sango. . .

Canko Djustabanov ekstaris antaŭ la juĝistoj — turkaj paŝaoj, ornamitaj abunde per oro kaj arĝento. Li parolis trankvile, malrapide kaj saĝe: „... Mi tre bone scias, ke via regno estas granda, ke la forto, la armeo kaj la armiloj estas en viaj manoj..., sed mi scias ankaŭ, ke vi estas barbaroj kaj tiranoj... Nia celo jam estas atingita. Sciu do, ke ni venkis...“

Preskaŭ samtempe tri grandaj bulgarioj diris la samon. Ni rememorigu la vortojn de Benkovski sur monto- supro Lisec: „Turkujo, mi venkis vin!“ kaj la vortojn de Baĉo Kiro: „Mi atingis mian celon: la kanono pafis. Eŭropo aŭdis, ĝi intervenos en la turkajn aferojn, la stato ne restos sensanga. Ekde nun mi pro nenio maltrankvilas, eĉ se oni pendumos min sur tiu ĉi pirarbo.“

¹ T. e. Canko Djustabanov, la vojevodo el Gabrovo.

² T. e. en rusa lingvo.

³ Ĥaĝi Dimitro kaj Stefan Karaĝa — famaj vojevodoj de taĉmento kontraŭ la otomanoj en 1868 j. pereintaj en la batalo.

Nia celo en Bulgario estas: frateco kun ĉiu, sendepende de lia religio kaj nacio. Ni etendas manon al ĉiu, kiu deziras verŝi sangon kune kun ni por vivo kaj libereco homa.

*

Mi dediĉis min al mia patrujo: servi al ĝi ĝismorte kaj labori laŭ la popola volo.

*

Se mi gajnos, mi gajnos por la tuta popolo, se mi perdos, mi perdos nur min mem.

Vasil LEVSKI

Dolĉa kaj glora estas la motro por la patrolando. Mi ankaŭ volas morti por la popola libero. For la jugon de la tiranoj! Karaj fratoj, al armiloj! Unuvoĉe ni voku: „Liberon aŭ morton!“

Baĉo KIRO (1835—1876)



KAVALIRO DE DU STELOJ

Okaze de la 75-a naskiĝtago de
Nikola Mišev — Kamarad (la 1-a de majo)

En junio 1939 la konata E-pioniro Ivan Vasilev el Pazarĝik iniciatis ekskurson al elektrocentralo Vâca apud vilaĝo Kričim. Partoprenis pli ol 25 esperantistoj el Pazarĝik, Plovdiv kaj Asenovgrad.

Antaŭ la elektrocentralo nin atendis ridetanta kamarado kun larĝaj ŝultroj de laboristo, kun dikmuskolaj manoj. El sub densaj brovoj nin rigardis paro da honestaj okuloj. Tio estis Nikola Mišev.

Per kelkaj vortoj en Esperanto li bonvenigis kaj invitis nin en la ejon, kie zumis la dinamomaŝinoj. Ni observis ilin kun vigla intereso, ĉar tiutempe en suda Bulgario Vâca estis la nura elektrocentralo.

Poste ni iris plu tra la intermonto kaj atingis la riverbaraĵon. En ties pitoreska ĉirkaŭaĵo oni fotis nin, ni kantis kaj dancis sub la sonoj de gitaro, kiun kunportis iu pazarĝikano.

Tagmanĝinte sub la ombroj de kadukaj salikoj ni alpaŝis al la „literatura parto“. David Sasonov deklamis fragmentojn el „Septembro“ de Geo Milev, Ivan Bataklijev voĉlegis versaĵojn de Majakovskij, iu alia parkere recitis „Johano“-nde Smirnenski. Post tio kamarado Ivan Vasilev sin turnis al Mišev per la vortoj:

— Kamarad, elpoŝigu vian verskajeron.

Mišev ruĝiĝis pro ĝeno kaj ekbalbutis:

— Estas ridinde vicigi min kun tiaj titanoj kiel Geo Milev, Majakovskij, Smirnenski. Miaj versprovoj nenion taŭgas.

— Vi ne modestumu, sed legu! — insistis Vasilev.

Mišev nevolonte elpoŝigis iom ĉifitan kajeron kaj kun ĝenata mieno komencis legi versojn, en kiuj li prikantis

sian liberaman urbeton Bracigovo, ties revoluciulojn Vasil Petleŝkov¹ kaj Atanas Kabov².

Dum tiu tago mi ricevis sufiĉe da informoj pri Nikola Mišev. Naskita en 1901 en Bracigovo, li de infanaĝo vivis en mizero, simple malsatis. Por ne morti pro ftizo Nikola serĉis laboron en diversaj urboj, estis ministro en Pernik, tabaklaboristo en Ihtiman kaj Pazarĝik ktp. En la lasta urbo li unuafoje aŭdis pri Esperanto, havigis al si lernolibron kaj vortaron kaj fervore komencis lerni la lingvon.

Post la Unua Mondmilito oni malfermis en Bracigovo tabakentreprenon kaj Mišev revenis al sia naskiĝurbo. Li amikiĝis kun la junkomunistoj en tiu entrepreno kaj kune kun ili ribelis en septembro 1923 kontraŭ la faŝista administracio. Post kelkaj tagoj la ribelo fiaskis kaj Mišev estis arestita kaj malliberigita. Oni starigis lin antaŭ milittribunalo. Sed la juĝistoj ne trovis krimpruvon kaj liberigis lin.

Kaŝinte la ruĝan stelon en la koron, Mišev alpinglis sur sian bruston la verdan stelon kaj fondis Esperanto-societon. En la kurso, kiun li gvidis en la urba legejo, partoprenis kelkaj gelernantoj kaj tabaklaboristoj.

En la legejo Mišev pendigis murgazeton kaj la portreton de Zamenhof. Sub la portreto li gluis grandliteran sloganon: „Esperanto — lingvo internacia, triumfonta!“

Al la lokaj reakciuloj la vorto „internacia“ ŝajnis ege danĝera, kaj ili minacis likvidi la E-societon. Mišev turnis sin al la distrikta lernejinspektoro, kiu rilatis

¹ Gvidanto de la kontraŭotomana ribelo en aprilo 1876.

² Gvidanto de la kontraŭfaŝista ribelo en septembro 1923.



favore al Esperanto. Tiu lasta konvinkis la lokajn reakciajn regantojn, ke la Bulgara E-Asocio estas tolerata kiel kultura organizaĵo. Dank' al tio la loka societo vivis plu.

Dum vintraj vesperoj Miŝev kaj la ceteraj societanoj konversaciis en Esperanto, legis diversajn E-gazetojn. Ĉiutage la loka poŝtisto alportis al la societo fremdlandajn gazetojn, leterojn, poŝtkartojn. La animo de la societo estis Miŝev. Iom post iom lia pseŭdonimo „Kamarad“ akiris plaĉon ĉe la samurbanoj kaj ĉiuj alparolis lin per „Kamarad“, eliziante la „o“.

Kelkajn monatojn post la memorinda ekskurso eksplodis la Dua Mondmilito kaj niaj interrenkontoj ĉesis.

Dum 1941/1942 j. Miŝev ofte vizitis mian amikon komerciston Kosta Mavrov en Plovdiv kaj aĉetis de li farunon, sebon, fazeolon, ŝapon ktp. Kosta konfidis al mi, ke Kamarad havigas provianton al partizana taĉmento en Rodopi-montaro. Lastfoje mi vidis lin en la somero de 1943. Kosta informis min, ke la polico estas sur la spuroj de Nikola, tial li ekiros la padon de la partizana batalo. . .

Post kelkaj monatoj, en marto 1944, disfamiĝis, ke la rodopa partizana taĉmento „Anton Ivanov“ estas disbatita. Pereis pli ol 130 partizanoj, inter kiuj ankaŭ Kamarad. . .

Post la milito mi veturis al Bracigovo kaj vizitis la domon de Nikola. Lia edzino Nevena Miŝeva, mezaĝa virino kun meditema vizaĝo, rakontis al mi:

— Dum la milito de Hitler kontraŭ Sovetunio Kamarad fordonis ĉiujn siajn fortojn por subteni la partizanojn. Ĉiunokte mi knedis panon por ili. Ofte nia azeno portis la provianton. Sed en aŭgusto 1943 iu arbargardisto spionis la ŝarĝitan azenon kaj rekonis mian edzon. La fiulo denunciis lin al la polico. Kamarad kaŝis sin por ne esti arestita. Li aliĝis al la partizana taĉmento „Anton Ivanov“. Oni elektis lin viĉkomisaro. Dum decembro en la vintra bivako apud vilaĝo Batak kolek-

tiĝis 153 gepartizanoj. La nutroprovizo baldaŭ elĉerpiĝis. Grupo da partizanoj sin direktis al Batak por preni farunon. Tamen la domo, en kiu estis deponita la faruno, estis spionata, kaj la partizana kolono revenis la bivakon kun malplenaj manoj. Sed iliaj postsignoj ne estis forviŝeblaj sur la abunda neĝo kaj la persekutantoj atingis ilin. La partizanoj forlasis la bivakon kaj serĉis alian kaŝlokon. Tamen la diktavola neĝo kaj la milmila malamiko venkis ilin. . .

Kun ĉagrena vizaĝo Nevena detale rakontis al mi la tragedion de la partizana taĉmento. Pri sia edzo ŝi aŭdis iumatene, ke li estas kaptita en kabano apud la urbo kaj troviĝas en la lernejo, okupata de ĉassoldatoj. Oni verŝajne mortpafos lin. . .

Ege dezirante vidi lin lastfoje, la malfeliĉa edzino, akompanata de siaj tri infanoj, venis en la lernejon kaj ekstaris antaŭ subkolonelo Janev:

— Ni insistas vidi nian familiestron.

La subkolonelo, sidante oportune en fotelo, trinkis guton da varma kafo kaj respondis indiferece:

— Via edzo estas ĉifonvestita, kun pedikplena barbo. La infanoj terurigos vidante lin, la banditon.

Janev ne permesis intervidiĝon.

Nevena levis kontraŭ li siajn okulojn, kaviĝintajn pro sufero, kaj diris:

— Mia edzo ne estas bandito. Heroo li estas!

— Mi ne kontraŭdiros vin, — rikanis la subkolonelo, — li estas heroo laŭ via koncepto, sed similajn heroojn ni karesas per sabro ĉirkaŭ la kolo. . . — kaj montris al ŝi la pordon.

Noktomeze je la 14-a de marto, kjam en Bracigovo ĉiuj dormis, krom Nevena, antaŭ la lernejo haltis ŝarĝaŭtomobilo. El la budo de la ŝoforo saltis la sekreta policano Naumov kaj eniris la ĉambron, kie kuŝis la kaptitaj gepartizanoj. Li tralegis liston de mortigoj, entute por ĉi tiu nokto 11 personoj. Ankaŭ Kamarad aŭdis sian nomon kaj ekstaris. . .

Tra la fenestro de sia domo Nevena

vidis la silueton de la ŝargăuto. El sub la veturiltendo iu fumis. La ŝargăuto direktis sin al la monto. La koro de la virino konvulsiiis. . .

Proksime de vilaĝo Batak, en la loko Mirčovica, oni surterigis la kaptitojn kaj vicigis ilin antaŭ plotono de soldatoj kaj paro da policanoj. Naumov kaj la plotonestro — malalta vipervi-zaĝa serĝento, komencis marodi — peltojn, horloĝojn, ŝuojn. Kamarad ekkriis:

— Friponoj! Vi forrabas niajn vestojn, sed la ideojn vi ne povas elŝiri el niaj koroj!

Dirinte tion, li sin turnis al la soldatoj:

— Fratoj! Inter ni troviĝas patrino kun eta infano. Ĉu vi ŝin pafmortigos? Ankaŭ mi havas tri infanojn. Vi certe estas patroj. Pensu pri viaj infanoj, ĉar se vi mortpafos nin, vin juĝos popola tribunalo!

Liaj vortoj ŝanceligis la soldatojn. Vidante, ke la plotono ne obeos al liaj ordonoj, la serĝento kriis:

— Volontuloj, elviciĝu!

Neniu el la soldatoj elpaŝis. Nun la serĝento direktis sian mitraleton kaj falĉis du homajn vivojn — de la partizano Najĉev kaj la partizanino Ceca.

Post tio la armilo difektiĝis. Furioze ekscitita, la serĝento komencis pafmortigi per revolvero.

Intertempe la sekreta policano Naumov kun ponardo en la mano alpaŝis al Kamarad kaj fiksis lin per siaj sangavidaj okuloj.

— Vi, monstro, — ekparolis Miŝev, — faru tuj vian krimon!

— Mi propramane estingos vian vivon! — minacis la policano. — Vi ne ĝisatendos la Ruĝan Armeon!

Dirinte tion, li ponardis la maldekstran ŝultron de Miŝev.

Antaŭ ol fali teren la partizano ekkriis:

— Malgraŭ ĉio la Ruĝa Armeo liberigos nian popolon. Mi vidas, kiel ĝi proksimiĝas al nia lando. . .

Rakontinte pri la golgoto de sia edzo Nevena konkludis:

— Kamarad batalis kaj pereis samkiel la herooj de Aprilo kaj Septembro.¹ El lia sango kaj el la sango de liaj kunbatalantoj naskiĝis la nova vivo, kiun ni ĝuas nun.

¹ Aprilo — t. e. la kontraŭotomana Aprila Ribelo 1876 j. Septembro — t. e. la kontraŭfaŝista Septembra Ribeio 1923 j.

ORGANIZA VIVO

NACIA PEDAGOGIA ESPERANTO-KONFERENCO

La 1—2-an de aprilo en u. Vraca okazis Nacia Pedagogia E-Konferenco, kiun partoprenis pli ol 80 instruistoj el la tuta lando.

Du praktikaj lecionoj, faritaj la unuan tagon de Enjo Daskalov — E-instruisto en la Teksa Teknikumo en Vraca, kaj Kunĉo Vălev — instruanto de Esperanto en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“ kaj sekretario de BEA, donis bonan bazon por vigla diskutado pri la metodoj kaj formoj de la E-instruado kaj ties praktika aplikado.

La sekvan tagon E. Daskalov faris prelegon pri la teknikaj helpiloj ĉe la E-instruado. Dank' al sia obstina laboro kaj amo al Espe-

ranto li estas sukcesinta organizi en la teknika kumo bonan instrukabineton de la Internacia Lingvo kun multego da instrubildoj kaj pentraĵoj, gramofono, magnetofono, projekciilo k. a. En sia prelego li kompetente kaj lerte montris la manipuladojn per tiuj instruhelpiloj.

K. Vălev faris grandan prelegon pri la plej aktualaj organizaj kaj metodikaj demandoj de la E-instruado en nia lando. La prelego abundis je praktikaj konsiloj kiel konkrete agi por altiri la instruistojn al Esperanto, por reteni ilin en la E-movado, por disvastigi Esperanton inter la lernantoj, K. Vălev substrekiis, ke de-



cida ĉe la E-instruado restas la figuro de la instruanto: li devas senripoĉe regi la lingvon, koni bone la metodikon de la lingvo-instruado kaj — la plej grava: labori kun neestingebla amo al Esperanto kaj al siaj lernantoj, kun firma deziro nepre fari ilin bonaj kaj fidelaj esperantistoj.

En la diskutado oni trovis ambaŭ prelegojn tre utilaj. Ĉiuj konferencanoj esprimis dankon al CK de BEA kaj ĝia Instruista Sekcio pro la ege aktuala iniciato aranĝi la konferencon. Oni esprimis dankon ankaŭ al la lokaj instruistoj-esperantistoj Enjo Daskalov, Bojĉo Mladenov, Georgi Marinov k. a., kiuj streĉe laboris por dommastri bone la konferencon.

Fine de la kunsidoj estis akceptita salutte-

legramo al CK de BKP kaj proponojn al la Ministerio de Popola Instruado.

Lige kun la konferenco estis aranĝita E-ekspozicio. En ĝi estis prezentita la riĉa interna vivo kaj internacia agado de la junaj esperantistoj en la Teksa Teknikumo, kiuj lernas fakultative Esperanton sub la gvido de Enjo Daskalov kaj aktive laboras en sia E-societo „Anne Frank“.

Post la konferenco aŭtobuso veturigis kelkdekojn da konferencanoj al la vidinda groto „Ledenika“ en la Balkan-montaro.

La Nacia Pedagogia E-Konferenco sendube donos novan puŝon antaŭen al la disvastiĝo de Esperanto inter la bulgaraj instruistoj kaj lernantoj.

Instruisto

ПРЕДЛОЖЕНИЯ НА НАЦИОНАЛНАТА ПЕДАГОГИЧЕСКА КОНФЕРЕНЦИЯ

На 1—2 април т. г. в гр. Враца се състоя Национална педагогическа конференция на преподавателите по есперанто, свикана от Учителската секция на Българския есперантски съюз. С цел да се обмени опит, на конференцията бяха изнесени два открити урока и две беседи във връзка с използването на учебно-технически средства при обучението, сегашното състояние на работата по разпространението на есперанто между учителите и предстоящите задачи.

Като се има предвид, че обучението по есперанто ефикасно допринася за разширяване на общата и езиковата култура на учащите се и активно подпомага осъществяването на нравственото, патриотичното и интернационално възпитание, че служи за създаване на дружески отношения между хората и народите от различни страни, като ги сплотява в борбата за мир и мирно сътрудничество, конференцията предлага на Министерството на народната просвета, на окръжните отдели „Народна просвета“ и на директорите на училищата:

1. Да посигурят факултативното изучаване на есперанто от учениците във всички видове и степени училища, като обучението се води в продължение на две години по два часа седмично.

2. Да оказват помощ на кръжочното изучаване на есперанто, като МНП уреди въпроса за заплащането труда на преподавателите по езика в кръжоците.

3. Изучаването на есперанто да се включи в списъка на извънкласните форми.

4. Чрез окръжните отдели „Народна просвета“ МНП да осигури контрол върху работата на преподавателите по есперанто.

В отговор на тези грижи преподавателите по есперанто ще разгърнат богата дейност по патриотичното и интернационалното възпитание на младото поколение чрез международната кореспонденция, чрез размяна на предмети, рисунки и др., изработени от самите ученици, чрез взаимни посещения и гостувания, чрез участие в международни курсове, лагери и лагер-школи, в международни есперантски трудови бригади, семинари и др.

От участниците в конференцията

II INTERNACIA ESPERANTO-SEMINARIO KAJ FERIADO EN VELINGRAD

18—29 de septembro

Promenadoj, montaj ekskursoj, mineralakva banado (plaĝo kaj banejoj), vesperaj kulturaranĝoj ktp.

Loĝado: en du- kaj trilitaj ĉambroj en la moderna kaj belege situanta ripozdomo „Koljo Fiĉeto“.

Aliĝkotizoj: por bulgaroj — 54 levoj, por eksterlandanoj — 72 levoj (eblas pago ankaŭ ĉe la alveno).

Rezervitaj nur 100 lokoj, do ne prokrastu vian aliĝon!

Adreso: Manol Ĉolev, 4600 Velingrad, Bulgario.



VERDA TABULO

En la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1976 distingiĝis: DIMITRO PETKOV — E-instruisto el Gorna Orjaĥovica — varbis 136 abonantojn;

DIMITRO M. GENOV — de E-societo „Kulturo“ Plovdiv — varbis 35 abonantojn.

Dankon al niaj aktivuloj!

JUBILEA JUNULARA KAJ STUDENTA E-KONFERENCO

La 11-an de aprilo en Ruse okazis konferenco de la Bulgara E-Junularo, kiun partoprenis grupoj el Sofio, Plovdiv, Varna, Ruse, Smoljan, Târgoviște, Lovec, Pleven, Ĥaskovo, Svištov. Ĉeestis k-do Dolapĉiev el UK de Komsomolo en Ruse kaj E-instruistoj.

Prelegojn faris la juna instruistino Atanaska Taŝeva el Ĥaskovo je temo „Esperanto — lingvo de la paco“ kaj la prezidanto de BEJ inĝ. Angel Todorov je temo „Esperanto kaj la lingva milito“. Sekvis vigla diskutado. Oni faris multajn utilajn rekomendojn pri la propagando de Esperanto, pri organizo de literaturaj kaj parolantaj E-rondoj, eldono de E-kantaro ktp.

Fine k-do Dimitro Papazov — sekretario de BEJ, parolis pri la partopreno de la bulgara E-junularo en la 39-a kongreso de la bulgaraj esp-oj en Ruse (10—12 de julio) kaj la okazonta enkadre de tiu kongreso junulara konferenco, kiu traktos la agadon de BEJ kaj elektos novan estraron.

Viglan intereson la ĉeestantoj montris al la Internacia Arkeologia Laborbrigado por la E-Junularo, kiu okazos de la 8-a ĝis la 31-a de aŭgusto 1976 en u. Marica, Bulgario.

Kaj, kiel kutime, estis multa kantado, dancoj, rido, amuzoj.

ark. Krâstina Mileva

Tri novaj E-societoj en Varna

La 18-an de marto en Varna surbaze de E-kurso gvidata de k-do Dimitro Dimov — sekretario de DK de BEA, en la Ŝtata Asekura Instituto estis fondita E-societo „Printempo“ kun 22 membroj. Prezidanto — Stefka P. Dimova, sekretario — Leonid Marinov.

La 26-an de marto en la urbo estis fondita E-societo „Justeco“, en kiu membras juĝistoj, prokuroroj, advokatoj. Tio estas rezulto de interesa kaj bone argumentita prelego de Dimitro Dimov, mem advokato, kaj de la ĵus komenciĝinta E-kurso, kiun li gvidas. Kiel prezidanto estis elektita Paskal Bogoslovov — eksjuĝisto, nun advokato.

La 29-an de marto en la Supera Maŝinelektra Instituto en la sama urbo naskiĝis nova studenta E-societo — „Verda Torĉo“ — kun 17 membroj. Prezidanto — Emil Dimov, studento. Tuj sub lia gvido komenciĝis E-kurso.

Goergi Dimov

Marija Angelova en Târgoviște

La ŝatantoj de la muzikarto en u. Târgoviște havis la plezuron aŭskulti koncerton de la konata kantistino-esperantistino Marija Angelova. Ŝia repertuaro estis riĉa: „Kantato pri la papilio“ de Andrej Kampera, „Nina“ de Pergalezi, „Sopiro al la printempo“ de Mozart k. a. Pro sia altnivela arto Angelova ricevis varman aplaŭdon de la publiko.

Je la fino de sia koncerto la artistino plenumis speciale por la esperantistoj „Mi ekamis por suferi“ de Sergej Raĥmaninov.

Kortuŝa estis la momento, kiam junpioniroj-esperantistoj prezentis al ŝi florojn.

La koncerto de M. Angelova estis ankaŭ bona propagando pri Esperanto.

D. Koseva

Esperanto en jubilea ekspozicio

Fotoj, rakontantaj pri la okazinta en urbo Vraca 19-a TEJO-kongreso, estas parto de inaŭgurita la 2-an de aprilo en la salonoj de la Distrikta Arta Galerio granda ekspozicio „Dudek aprilaj printempoj en Vraca“. La materialoj de la ekspozicio montras la progresantan socialisman konstruadon en la urbo.

L. Trifonĉovski

deziras korespondi

Bulgario

Elena Radeva — ul. Lenin 24, 6300 Ĥaskovo (instruistino — kun ĉel pri ĉt)

Il gimnazio „Prof. Asen Zlatarov“, la esperantistoj el la 9 klaso, 6300 Ĥaskovo (kun ĝelernantoj el ĉel pri ĉt)

Andrej S. Guŝev — 5060 Resen, Velikotârnovsko (33-jara instruisto — kun ĉel pri ĉt; kolektas alumentetikedojn)

Ana Zlateva — ul. Oboriŝte 17, Burgas (18-jara lernantino — kun ĉel pri ĉt)

Angel Jordanov Dalov — bulv. Osvoĵdenie 52, Burgas (60-jara E-veterano)

Hungario

Korespondantojn por siaj E-ĝelernantoj (11—14-jaraj) serĉas ilia instruisto: Mozes Daniel — H-2911, Mocsá (ili kolektas ankaŭ bk, pm, fotojn, insignojn ktp)



TRA LA E★ MONDO

KOMUNIKO

En la tagoj de la 2-a ĝis la 4-a de aprilo 1976 en Krakovo okazis la laŭvica Oka Konsultiĝo de reprezentantoj de la Esperanto-asocioj kaj movadoj en la jenaj landoj: Bulgario, ĈSR, GDR, Hungario, Pollando, SSR kaj USSR.

La Konsultiĝo traktis problemojn de la teoria kaj praktika agado de la esperantistaro en la reprezentitaj landoj.

Estis ellaborita vico da rekomendoj al la koncernaj landaj asocioj por pritraktado kaj realigado.

Specialan atenton oni turnis al la laboro de la antaŭstaranta en proksima julio (u. Ruse, Bulgario) Sepa Ĝenerala Konferenco de la Mondpaca Esperantista Movado (NEM) kaj al la plua plibonigo de la redaktado kaj eldonado de ties revuo „Paco“ utiligante por tiu celo la dokumentojn de la Konferenco en Helsinki (1975) kaj la pacproponojn ellaboritajn de la 25-a kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio, kiel ankaŭ la decidojn de la venontjara Monda Packongreso en Varsovio.

Oni pridiskutis ankaŭ vicon da taskoj en la sfero de la praktika kunlaboro de la koncernaj landaj asocioj.

En la tagordo figuris ankaŭ la temo pri la parlamenta kaj regiona agadoj en la socialistaj landoj lige kun la programo pri similaj agadoj de Universala E-Asocio.

Estis traktitaj iuj sciencaj kaj teoriaj problemoj kiel ekz. pri ellaboro de fundamentaj sciencaj materialoj rilate la staton kaj evolutendencojn de la problemoj de Internacia Lingvo, kunlaborado kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvoproblemo (CED) k. a.

Oni prenis decidojn pri la preparo de la venontjara Naŭa Konsultiĝo.

La Prezidiumo de la Pola E-asocio aranĝis amikan akcepton por la partoprenintoj en la Konsultiĝo.

II

La Konsultiĝon partoprenis ankaŭ reprezentantoj-gvidantoj de la junularaj sekcioj de la koncernaj landaj asocioj, kiuj pritraktis komunajn kaj specialajn problemojn de la junulara esperantista movado en la socialismaj landoj.

La reprezentantoj informiĝis reciproke pri la strukturo kaj atingoj en siaj landoj por trovi pli konvenan bazon por kunordigi la estontan agadon.

Oni esprimis deziron kaj pretecon plifirmigi la kontaktojn inter la junaj esperantistoj cele al pli vasta amikeca kunlaboro inter la junularo de la socialismaj landoj por komunaj celoj.

Elirante el la fakto, ke la Konsultiĝo de la junularo estis tre fruktodona, ĉiuj reprezentantoj de la junularaj sekcioj de la socialismaj landoj interkonsentis, ke valoras kaj necesas daŭrigi la partoprenon de la junularo en la sekvontaj laŭvicaj konsultiĝoj.

Estas petataj ĉiuj esperantistaj kaj aliaj informorganoj publikigi parte aŭ entute tiun ĉi komunikon.

Krakovo, P. P. Respubliko
5. IV. 1976

De la Konsultiĝo

IPTEA DEKJRA

Dum la kuranta jaro la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA) celebras sian dekjarigon.

Fondita en 1966 enkadre de la 51-a UK de Esperanto en Budapeŝto de 14 reprezentantoj el 8 landoj, hodiaŭ IPTEA ĝuas rimarkindajn sukcesojn en sia agado. Dum la pasinta periodo ĝi sukcesis altiri kaj membrigi pli ol 600 laboristojn kaj oficistojn el la sfero de poŝtoj, telegrafoj, radio kaj televido kaj simpatiantojn el pli ol 40 landoj de la kvin kontinentoj.

La ekzisto de nia asocio estas konata al ĉiuj poŝtadministracioj de la ŝtatoj-membroj de la Universala Poŝta Unuiĝo (UPU) pro la propono farita de IPTEA pri akcepto de Esperanto kiel laborlingvo en UPU.

La asocio organizis sekciojn en sep eŭropaj landoj kaj PTT-rondojn en kelkaj aliaj. Aktive laboras por altiro de novaj membroj kaj por disvastigo de Esperanto en PTT-medioj la sekcioj en Bulgario, Finnlando, Francio, Hungario k. a.

Enkadre de la universalaj kongresoj de UEA nia asocio organizas ĉefkunvenojn, en kiuj ĝi traktas kaj solvas siajn problemojn, popularigas sian agadon kaj akiras ĉiujare novajn adeptojn en la tuta mondo. En la ĉefkunvenoj oni elektas kaj kompletigas la estraron de la asocio per novaj aktivaj kolegoj el diversaj landoj.

La sidejo de IPTEA estas en Sofio — Bulgario, kie troviĝas ankaŭ la redakcio de la asocia presorgano „Interligilo“, disvastigata en pli ol 40 landoj.

En sia antaŭstaranta — sepa laŭvice — ĉefkunveno, kiu okazos enkadre de la 61-a UK de Esperanto en Ateno, IPTEA sin prezentos unueca kaj solidara kun UEA, aktiva kaj kapabla solvi sukcese la demandojn pri disvastigo de Esperanto inter la okupatoj de la sfero de PTT, radio kaj televido en la tuta mondo.

Draguško Petrov



Laŭ mi ne estas vane, se ĉiu el ni turnus atenton al sia ĝisnuna E-korespondado por vidi, ĉu ĝi respondas al la celoj de vera internacia korespondado: kontribui por popularigo de la sukcesoj de nia socialisma patrolando, por firmigo de la internaciaj amikeco kaj kunlaborado, por aktivigo de la batalo por paco kaj socia justeco en la mondo; ĉu ni klare vidas nian rolon kiel portantoj de la kulturaj valoroj de nia popolo al la aliaj popoloj.

Esperanto vivas jam 89 jarojn kaj ĝi montriĝis bonega rimedo por komunikado kaj korespondado inter diverslandaj esperantistoj. La personaj kontaktoj estas vere tre valoraj por formigo de amikaj rilatoj inter la homoj kaj de tie ĉi — inter la popoloj. Dank' al la internacia korespondado per Esperanto konstante kreskas niaj konoj pri moroj kaj kutimoj de diversaj popoloj, pri la historio de tiuj ĉi popoloj, pri la geografio, arkitekturo, literaturo ktp. de la koncernaj landoj, pri ilia laborista klaso kaj ties bataloj.

Gravas, ke nia korespondado ne estu nur por nia propra intereso kaj profito, ke ni ne niam neglektu la socian servon de Esperanto.

La bulgaraj esperantistoj havas riĉegan materialon por sia internacia korespondado. Kun merita fiero ni devas rakonti al niaj leteramikoj pri la rezultoj de la paca laboro de nia popolo, pri ĝia historisignifa atingaĵo — dum 30 jaroj transformi sian postrestintan, malriĉan agrikulturan landon en antaŭenirantan, riĉan, industri-agraran landon kun floranta kulturo, arto kaj scienco, kun ĉiam kreskanta vivnivelo de ĉiuj socitavoloj. Aparte notindaj estas la sociaj atingaĵoj de nia popolo: senpaga medicina helpo kaj priservo por ĉiuj; bonkvalita kaj malmultekosta nutraĵo por ĉiuj laboristoj, oficistoj, studentoj, lernantoj, kies regi-elspezoj estas pagataj de la ŝtato; ĉiujara ripozado de centmiloj da laboruloj en belaj kaj komfortaj ripozdomoj kontraŭ pago nur de tridek procentoj el la reala kosto. Oni povas citi ankoraŭ tutan serion da akiraĵoj kiel ekzemple la pensiojn pro emeriteco kaj invalideco, la regulan ĉiujaran feriadon, pagatan de la ŝtato, la senpagan studadon en ĉiuj lernejspecoj, la reton de infangardenoj kaj infandomoj ktp.

Ni devas fieri ankaŭ pri la ekstera politiko de nia lando — fortika bastiono de la paco sur la Balkanoj kaj en la tuta mondo.

Bonega estas la geografio situo de nia lando — en la sudorienta parto de Eŭropo kaj en la centro de la Balkana Duoninsulo. Pro sia varia pejzaĝo kun diverstipaj montoj, vastaj ebenaĵoj, pitoreskaj valoj kaj riĉaj arbaroj, granda parto el kiuj estas eterne verdaj, koniferaj, kun la varma Nigra Maro kaj ĝiaj senfine longaj orsablaj plaĝoj, kun la multnombraj historiaj monumentoj kaj naturaj rimarkindaĵoj (mineralakvaj fontoj, grotoj, kanjonoj, rokoj ktp.) — Bulgario estas alloga objekto por

ĉiuj eksterlandaj turistoj. Ĉiu, vizitinta ĝin unu fojon, deziras viziti ĝin plurfoje, fariĝas ĝia amiko.

Povas okazi, ke ni trafus iun korespondanton erarigitan de la abomenaj elpensoj de la reakcia propagando. Nia devo estas pacience, sed konvinke, per faktoj, per ekzemploj kaj seriozaj pruvoj helpi al ili kompreni sian erariĝon, amikigi lin al nia popolo kaj lando. Iufoje ni povas renkonti obstinan krudan malamikon de la socialisma sociordo. Ni devas perletere klopodi por almenaŭ igi lin pensi kaj iom post iom konvinkiĝi pri la stabileco kaj la potenco de nia lando kaj de la tuta socialisma landaro.

Gravan lokon en niaj koresponaĵoj devas trovi ankaŭ la E-movado en nia lando kaj en niaj loĝlokoj. Oni devas popularigi nian agadon, niajn sukcesojn kaj malfacilaĵojn sur la E-kampo, kaj la agadformojn, kiujn ni aplikas por antaŭenigi la Movadon.

Pri la samaj temoj devas okupiĝi ankaŭ la kolektiva kaj intersocieta internaciakorespondado.

Nia E-societo „Libero“ en Ruse havas bonajn rilatojn kun la E-klubo en Riga (USSR), ankaŭ kun la Drezdena E-grupo (GDR) k. a.

Bona tradicio ĉe ni estas subteni niajn eksterlandajn samideanojn ĉe gravaj iniciatoj. Ekzemple la anoj de nia societo sendis aparte, kolektive kaj en la nomo de la societo multajn materialojn por la ekspozicio, aranĝita okaze de vespero dediĉe al Popola Respubliko Bulgario en la Esperanto-klubo en Riga. Dank' al niaj materialoj la rigaj geamikoj eksciis multon novan pri nia lando, pri niaj elstaraj homoj, pri nia vivo, literaturo, historio, pri nia E-movado. Pro tio ni ricevis dankleterojn de multaj rigaj klubanoj.

Multajn salutkartojn sendis niaj societanoj ankaŭ al la Drezdena E-grupo okaze de letervespero, aranĝita de ĝi.

Ne malpli grandan helpon ni donis ankaŭ al la E-klubo en Barnaul (USSR), subtenante ĝian iniciaton pere de pli ol 80 fotoj. La fotoj estis akompanitaj de klarigoj pri la monumentoj, konstruitaj en Bulgario memore al rusoj kaj aliaj sovetianoj. Tiujn fotojn ni sendis por ilia ekspozicio „Monumentoj konstruitaj eksterlande al rusaj kaj sovetaj homoj“. Dank' al ili la ekspozicio pliriĉiĝis. Kaj iuj samideanoj eĉ malkovris la nomojn de siaj parencoj, verŝintaj sian sangon sur la bulgara tero por la liberigo de nia popolo el la otomana jugo.

Ankaŭ ni ne estis forgesitaj de niaj eksterlandaj amikoj. Ni ricevis amason da leteroj kaj salutkartoj el Sovetunio, Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Francio, Hispanio, eĉ el Aliasko kaj aliaj foraj landoj okaze de la 30-jara datreveno de nia liberiĝo el la faŝismo.



BAĈO KIRO ANTAŬ LA TRIBUNALO

La pordo de la juĝejo malfermiĝis. En la ĉambron Fazlâ paŝao krude puŝis bonaniman homon kun profundaj belaj okuloj. La homo estis en simpla vilaĝana vestaĵo.

Tuj ĉuj eksilentis kaj turnis la kapojn. Tiuj, kiuj vidis lin unuafoje, estis mirigitaj. Ĉu tio estas la instruisto de Bjala Ĉerkva? Ĉu li aŭdacis levi manon kontraŭ la sultanon?

Baĉo Kiro trapasis laŭ la mallarĝa vojeto inter la ruĝaj fezoj, sekvate de la paŝao kaj kvar policianoj kun longaj bajonetoj. Malicaj rigardoj renkontis kaj akompanis lin. Sed li ne embarasigis. Ekstaris fieraj kaj sentima antaŭ la juĝistoj.

Komenciĝis la pridemandado. Baĉo Kiro respondis trankvile kaj certe. La turkoj vane atendis, ke li ekstremus kaj klinus kapon, petante indulgon.

La advokato komencis:

— Sinjoroj, vi mem komprenas, ke antaŭ vi staras stulta homo, frenezulo. La tuta ribelo estas afero de tiaj frenezaj homoj. . .

La advokato estis dungita de la tur-

koj. Li sciis, ke ili ne juĝas frenezulojn, kaj rapide decidis tiamaniere pledi por Baĉo Kiro. Sed Baĉo Kiro ne permesis al li parolaĉi pri la popola batalo. Li turniĝis al la advokato kaj ekkriis:

— Retiru viajn vortojn! Nek mi, nek iu ajn el la bulgaraj ribelantoj estas freneza!

La advokato finis sian sensencan paroladon kaj riverencis al la juĝistoj. Tiam Baĉo Kiro komencis kun flaman-taj okuloj kaj firma voĉo deklami sian lastan versaĵon:

Estas Baĉo Kiro mi. Sen tim'
mi ribelis kun pafil' en man'!
Tagojn dek mi kontraŭ la tiran'
firme luktis en la monaĥej'
por libero kaj popola ĝoj'.

Jen — la ŝnuron kroĉas nun mi mem!

En la ĉambro ekestis plena silento. La turkoj estis konsternitaj.


La juĝisto estis mordinta sian lipon. Subite li leviĝis kaj ekkriis furioze:

— Al morto! Forkonduku lin!

Laŭ A. Pavlov

Ĉevalsalto

Se via ĉevalo konas la ŝakludon, ĝi saltos tiel, ke vi ricevos aktualan sloganon.



(El paĝo 16)

Ĉu la internacia E-korespondado estas individua, ĉu kolektiva aŭ intersocieta, la rezulto estas la sama — reala kontribuo por kreskigo de amikeco inter la popoloj, servo al la noblaj celoj de paco, interkompreniĝo kaj proksimiĝo de la nacioj.

Sofia Sutrova

Solvo de la vortenigmo en № 1

Horizontale: 1. SOS. 3. Beb. 6. Aer. 8. Gas. 10. MP („Mia penso“). 11. Ĝis. 13. HT. 14. Lenin. 15. Ra. 17. Mal. 18. El (al). 19. Esperanto. 22. Kol. 23. BEA.

Vertikale: 1. Sep. 2. Or. 4. Eg. 5. Bah (ch). 6. Amare. 7. Dinar. 9. Stelo. 11. Ĝemel. 12. Silab. 16. Ask. 18. Eta (ata). 20. Po. 21. Ne.

Korekte solvis la enigmon: el Bulgario: Stojko Rusev, Ali Mustafov, Penĉo Petrov; el ĈSR: Josef Cink, Josef Soušek; el Hungario: Laszlo Eördögh; el USSR: Vladimir Opletajev, S. Liuto, Birute Trimakiene. Inter ili estis lotumitaj premie E-libroj.

La 30-an de marto post longa malsanado forpasis 71-jara nia fervora s-anino el Varna

FLORA P. KOVAĈEVA

Ŝi estis membro de tuta E-familio — edzo kaj du filinoj, ĉiuj aktivaj geesp-toj kaj pac-batalantoj.

„DR VJETNAMIO“.

Fremdlingva Eldonejo — Hanoi,

1975, 20/18, 200 paĝoj

La libro aperis post la Pariza Konferenco pri Vjetnamio, kiam jam montriĝis, ke la heroeca vjetnama popolo en la suda parto troviĝas antaŭ sia liberiĝo elsub la jugo de la usonaj imperiistoj kaj ties sajgonaj marionetoj. Leginte ĝin oni sentas la novan atmosferon en la nuna jam liberiĝinta tuteca Vjetnamio. Oni kun merita fiero pentras la ĉiuflankan vivon de siaj prauloj ekde antaŭ kvar jarmiloj, priskribas koncize la diversajn historiajn etapojn de venkoj kaj malvenkoj de la loĝantoj de tiu antikva lando. En la libro estas multaj ilustraĵoj kaj mapoj, kiuj helpas la leganton penetri en la malnovan historion de tiu multe suferinta heroeca popolo kaj samtempe esti atestanto de la nuna liberiĝinta kaj jam unuiginta sin lando.

La enhavo estas dividita en ĉapitroj kun informoj pri vjetnamaj etnografio, institucioj, ekonomio, edukado, sanprotekto, scienco, kulturo, arto, tekniko, beletro, internaciaj rilatoj k. a. La eldonaĵo estas bonkvalita, la stilo tre bona. Legante la libron oni sentas veran ĝuon. Ni rekomendas ĝin al ĉiuj esperantistoj.

Nano Nanov

E-kongreso en Prilep

Prilep invitas la 20-an kongreson de la jugoslavaj esp-toj je la 28—30 de julio 1976, do antaŭ la UK en Ateno. La urbo havanta 60 000 loĝantojn, laŭ sia ekstera aspekto estas la plej esperantista urbo en Jugoslavio. Ĝi fieras per monumento de Zamenhof en la urbo-centro, per kliniko „D-ro Zamenhof“ kaj restoracio „Esperanto“. Ankaŭ vigla E-movado ekzistas en Prilep.

Oni antaŭvidas, ke la kongreso estu ne nur manifestacio kaj plezuriga renkontiĝo de la esperantistoj, sed ke ĝi havu vere laboran karakteron. Enkadre de la kongreso, okazos diversaj fakkunvenoj, estos aranĝitaj ekspozicio de pentristoj-esperantistoj, ekspozicio de infandeseĝnaĵoj, ekskursoj al Kruŝevo — la plej alte situanta urbo en Jugoslavio, kaj al Bitolja.

Gastoj el eksterlando estos amike renkontataj, sed oni petas anticipan sciigon al la Loka Kongresa Komitato en Prilep.

TRA LA GAZETARO

En ĵ. „Rodopski Ustrem“ — u. Smoljan (15. I. 1976): artikolo „Fruktodona jaro“ de Mira Rajkova — pri la agado de la esperantistoj en Smoljan.

En la sama ĵurnalo (3. II): informo kun foto pri la meto de la mejloŝtono de la Domo de Internacia E-Lernejo apud Smoljan. Pri la samo informas ankaŭ ĵ. „Rabotniĉesko Delo“ (4. II) kaj ĵ. „Narodna Mladeŝ“ (9. II).

En ĵ. „Oteĉestven Front“ — Sofio (19. I): artikolo pri la bulgara verkisto Stojan Miĥajlovski de Vera Vasileva, en kiu oni mencias ankaŭ la ligojn de la verkisto kun bulgaraj esperantistoj.

En ĵ. „Rabotniĉesko Delo“ — Sofio (20. I) informo pri la formiĝo de Loka Kongresa Komitato por la 63-a UK de Esperanto en Varna en 1978 j.

En la sama ĵurnalo (21. III): konciza informo pri la Bulgara-Nederlanda Semajno, organizita en Hago lige kun la Semajno de Internacia Amikeco.

En ĵ. „Dunavska Pravda“ — u. Ruse (20. I): informo de Jordan Kalinov pri la preparlaboroj por la 39-a nacia bulgara E-kongreso en Ruse (10—12. VII. 1976). Pri la samo informas ankaŭ M. Keremidĉiev en ĵ. „Oteĉestven Front“ — Sofio (22. I).

En ĵ. „Sofijska Pravda“ — Sofio (23. I): informo pri E-kurso en u. Svoge, gvidata de d-ro St. Moraresku el Sofio.

En ĵ. „Oteĉestven Zov“ — u. Vraca (10. II): artikolo „Esperanto — lingvo de la pacbatalantoj“ de Bojĉo Mladenov.

En la sama ĵurnalo (9. IV): informo pri la nacia konferenco de la bulgaraj instruistoj-esperantistoj en Vraca (1—2. IV).

En ĵ.: „Zarja na komunizma“ — u. Loveĉ (10. II) informo de Ilija Ivanov pri la agado de la lokaj esperantistoj.

En ĵ. „Balkansko Zname“ — u. Gabrovo (10. II): informo pri la agado de la loka E-societo de inĝ. Ĥr. Mandev.

En ĵ. „Pravna Tribuna“ — Sofio (10. II): informo kun foto pri daŭriga E-kurso en la Justicpalaco en Sofio.

En ĵ. „Pirinsko Delo“ — u. Blagoevgrad (17. II): informo pri la distrikta konferenco de la esp-stoj de Simeon Angelov.

En ĵ. „Kom“ — u. Berkovica (18. II): informo pri la jara agado de la loka E-societo.

En ĵ. „Drjanovska Iskra“ — u. Drjanovo (5. III): informo pri E-ekspozicio en la urbo.

En ĵ. „Ŝumenska Zarja“ — u. Ŝumen (23. III): informo de J. Stanev pri la jarkunveno de la urba E-societo en Preslav.

En ĵ. „Rosica“ — u. Sevlievo (13. III): raportaĵo „Por paco kaj amikeco inter la popoloj“ de D. Dimitrov.